# Novjorka Prismo

Numero 137 Oktobro 2004

*The Esperanto Society of New York invites you to learn about ESPERANTO, the International Language, at its annual OPEN HOUSE!*

DATE: Friday, October 15, 2004, 6:30-9:00 pm

PLACE: United Federation of Teachers, 50 Broadway, 2nd floor, Room A (between Bowling Green and Exchange Place), NYC

PROGRAM: 6:30 – Refreshments

7:00 – New York esperantists will present short talks (in English) about Esperanto, its origins, and how it is used today. The program also includes a short lesson, songs in Esperanto, and a videotape about the International Language. Everyone is welcome! Bring a friend! ★

## Protokolo de la kunveno de la 17-a de septembro 2004

La UFT konstruaĵo oficiale fermiĝis pro la festotago de la juda novjaro. Tial, nia kutima kunvenĉambro ne haveblis. Unue, ni atendis ĉe la enirejo de la konstruaĵo. Ni devis translokiĝi al Cafe World, la restoracio, kie ni kutime iras post niaj formalaj kunvenoj. George BAKER faris ŝildon por sciigi malfruajn ĉeestantojn kien iri por la kunveno. Poste, li foriris, sed li devis tuj reveni, ĉar li ne povis trovi la kafejon, ĉar estis eraro en la adreso menciita en la e-poŝto de nia prezidanto, Tomaso ECCARDT. Samtempe, Jeff BLAKESLEE kaj mi iris al la ĝusta loko, atendis tie preskaŭ kvin minutojn, kaj revenis al UFT, ĉar ĝis tiam neniuj aliaj klubanoj aperis ĉe la kafejo. Dum Jeff kaj mi revenis al UFT, la aliaj ĉeestantoj iris al la kafejo per alia strato. Kiam Jeff kaj mi revenis al Broadway, ni vidis Tomason, kiu diris, ke la aliaj ĉeestantoj estas sur la vojo al la kafejo. Finfine, ni ĉiuj unuiĝis ĉe la kafejo. Ni tuj aĉetis bieron, supreniris al la manĝoĉambro kaj sidis kune ĉe unu longa tablo.

Je 7:10 ptm, Tomaso oficiale malfermis la kunvenon. Ĉeestis dek personoj. Naum KOPMAN, edzo de nia kasistino, Sofiya SOSKINA, ĉeestis. Nur estis unu aŭ du eraroj de literumado en la *Novjorka Prismo*, neniu grava afero.

Tomaso anoncis, ke Julius BALBIN estas en la malsanulejo St. Luke's en Novjorko.

Tomaso anoncis, ke li intencas sendi en oktobro leteron al personoj, kiuj ne pagis la kotizon por la nuna jaro. Povas esti, ke la slipo por la venontjara kotizo estu parto de la *Prismo* mem, uzante 8.5x14 paperon anstataŭ la kutima 8.5x11.

Post la anoncoj, la grupo partoprenis en longa diskutrondo pri kion fari pri interretaj organizoj kiel *Meet-up*, kiuj aranĝas kunvenojn ĉe restoracioj inter esperantistoj kaj personoj, kiuj eble interesiĝas pri Esperanto. La problemo estas, ke ni ne povas regi tion, kion *Meet-up* faras. Estas fakte komerca aranĝo inter la restoracioj kaj *Meet-up*. La restoracioj pagas kotizon al *Meet-up*, kiu aranĝas la daton de la kunveno, kaj ĝi faras varbojn por la restoracio kaj la kunveno. Eblas, ke neniu el nia grupo ĉeestos, kaj nur nekonatuloj, kiuj eble ne scias ion ajn pri Esperanto, ĉeestos, kaj ni perdos la okazon eduki tiujn personojn pri nia lingvo, nia klubo kaj nia movado. Tomaso demandas ĉu ni subtenu tiun organizon, kaj li diras, ke li ne persone volas fari tion, ĉar ĝi estas ekster nia rego. Oni proponis, ke almenaŭ unu aŭ du anoj de nia Societo abonu al *Esperanto Meet-up*, iru al ĉiu kunveno, kaj sciigu la reston de niaj klubanoj e-poŝte.

George disdonis informon pri la grupo *esperanto-novjorko*, kiu troviĝas sur la interretservo *Yahoo!*. Oni decidis, ke nia klubo agnosku la liston kiel utilan nedevigan ilon por komuniki kun nia grupo, sed samtempe mantenu oficialan liston por oficialaj anoncoj.

Tomaso menciis, ke li aldonis la anglalingvan urbonomon "New York" al sia retsitio. Li esperas, ke personoj, kiuj enmetas la vortojn "Esperanto New York" en serĉilon povos trovi nian sition pli facile ol antaŭe, kiam nur la nomo "Novjorko" menciiĝis.

Rochelle F. GROSSMAN parolis mallongtempe pri la Jarkongreso de ELNA, la Universala Kongreso de UEA, kaj sia ekskurso al alia parto de Ĉinio post la UK. Rochelle menciis, ke Arnold VICTOR kaj Tomaso LEONG ankaŭ ĉeestis la UK-on.

Je la naŭa horo ptm, Tomaso oficiale fermis la kunvenon. ★

*Protokolis: Stuart GREEN*

## Malfermita Domo




Ŝajnas, ke la membreco de nia klubo malgrandiĝis iom dum la pasintaj jaroj. Do por revivigi ĝin, ni bezonas okazigi sukcesan malfermitan domon. Kiom el vi volus prelegi dum 5 minutoj (en la angla) pri Esperanto (ekzemple, pri la lingvo, vojagado per Esperanto, Zamenhof, kongresoj, ktp.). Bonvolu e-poŝtigi min aŭ telefoni min ĉe 212-477-6516 pri via temo.

Por reklami la malfermitan domon, mi kreis afiŝon, kiun vi povus kopii kaj pendigi ĉe via loka biblioteko, lernejo, supermerkato, ktp. Vi trovos ĝin ĉe *http://www.geocities.com/esperanto_nyc/Poster_2004.doc* aŭ *http://www.geocities.com/esperanto_nyc/Poster_2004.html*

Ĉi jare ni kune faru la plej bonan malfermitan domon! Konsentite? ★

*Dankon, Tomaso*

## Kio estas scienco? (Tria parto)

*de Tom Eccardt*

Kiel dirite en la antaŭa parto de tiu ĉi artikolo, la bazaj principoj de la scienca metodo vere ne ŝanĝiĝis post la 19-a jarcento. Sed oni komencis pli detale pensi pri la filozofio de scienco, kaj oni malkovris pli da demandoj. Tiu pli profunda filozofia vidpunkto similas al la relativeco de Einstein kompare al tiu de Newton. Tiu de Newton estas speciala kazo de tiu de Einstein. Oni ne tute forĵetis la diraĵojn de Newton, sed klarigas, ke ili ne funkcias bone je altaj rapidecoj.

Nova demando, kiu estiĝis en la filozofio de scienco, temas pri la realeco de sciencaj entoj. Ĉu la elektrono estas vera ajo, aŭ ĉu ĝi estas nur matematika koncepto, kiu klarigas multajn fenomenojn? Ĉu la elektrono estas vera partikulo, aŭ ĉu tiu sub-mikroskopa ento estas nur analogo de makroskopa objekto? Malgraŭ ĝia simileco al familiara objekto, ĝi tamen ankaŭ kondutas kiel ondo. Neniu afero en nia familiara mondo kondutas kaj kiel partikulo kaj kiel ondo, do certe elektrono ne estas familiara partikulo, nur nekompleta analogio. Ĉu ni rajtas do nomi ĝin partikulo?

Eble pli grave estas, ke oni neniam rekte spertas elektronon. Do ĝia ekzisto ne estas tiel reala por ni kiel aliaj rekte observeblaj aferoj. Vi kaj mi povas tuj interkonsenti, ke antaŭ ni estas akvofalo. Sed estas pli komplike interkonsenti, ke antaŭ ni estas substanco, kiu konsistas el molekuloj kun du unu-elektronaj atomoj kaj unu ok-elektrona atomo ($H_2O$). Ni devus ankaŭ interkonsenti pri komplikaj sciencaj teorioj. Kaj estas pli verŝajne, ke nia percepto de akvofalo estas pli simila ol nia percepto (kompreno) de ties elektronoj.

Rimarku, ke oni ne disputas la teorion de elektronoj, nek la sciencajn metodojn, kiuj kondukis al ĝi. Oni nur demandas ĉu sciencе postulataj entoj havas la saman realecon kiel rekte percepteblaj aferoj. Antaŭ sepdek jaroj, oni supozis ke protono ne estas divideбla. Nun ni scias, ke ĝi konsistas el kvarkoj. Kian realecon havas ento, kiu tiom rapide ŝanĝiĝas? Aliflanke, eĉ primativa homo povis konsenti pri la evidentaj ecoj de akvo.

Kaj jen la debato inter realistoj kaj instrumentistoj: realistoj kredas, ke sciencaj entoj estas veraj, aŭ almenaŭ alproksimiĝas al la vero; instrumentistoj kredas, ke sciencaj entoj estas nur oportunaj fikcioj, instrumentoj, kiuj helpas nin kompreni la universon. Rimarku, ke realistoj kaj instrumentistoj ĝenerale konsentas pri sciencaj teorioj mem kaj pri la scienca metodo. Sed ili malkonsentas pri ilia interpretado.

Nun, ĉu ĉio ĉi estas nur semantika afero? Eble ne. En la sesdekaj jaroj, Thomas Kuhn esploris la sociologion de sciencaj revolucioj, kaj trovis, ke estas granda diferenco inter la ideala kaj la praktika funkciadoj de scienco dum revolucia periodo. Oni ĉiam supozis, ke nova teorio faligas malnovan, ĉar sciencistoj klare vidas, ke la nova estas pli bona. Kuhn trovis, tamen, ke estas malmulte da interkomunikado inter la diversaj skoloj de scienco. Do praktike, malmulte da sciencistoj ŝanĝas sian skolon aŭ pensmanieron post decidi, ke nova teorio estas pli taŭga ol malnova. Se Kuhn pravas, eble instrumentismo estas pli realisma filozofio ol realismo. Ŝajnas, ke kvankam scienco dependas de logiko, la akceptado aŭ malakceptado de teorio estas almenaŭ parte sociologia afero. Ne estas klare, kiel la ekzisto de realaj, vere ekzistantaj sciencaj entoj povas dependi de sociologia fenomeno.

Ankaŭ ne estas klare, ke scienco ĉiam promenas en direkto al la "vero". Ekde la alveno de la kvantuma teorio, sciencistoj – ne nur filozofoj – spekulativas pri la limoj de sia scio. Scienco nuntempe alproksimiĝas al filozofio en plia aspekto: sciencistoj spekulativas pri kiel nia universo estus, se unu el la postulataj fizikaj konstantoj havus malsaman valoron. Kaj jen, alvenis la antropa principo: estas maleble, ke la konstantoj estu tre malsamaj, ĉar tio malebligus la fizikan ekziston de homoj, kaj ne-ekzistantaj homoj ne povus malkovri la konstantojn! Por realisto, ĉio ĉi eble estas paradokso. Por instrumentisto, tia spekulativado ne estas scienco: se la konstantoj ne klarigas la universon, sed nur konfuzas, ili ne povas esti sciencaj.

Mi esperas, ke plaĉis al vi tiu ĉi promenado en la ĝardeno de la filozofio de scienco. Mi kredas, ke estas grave scii ion pri la tero kiun oni paŝas por eviti enfalujojn. Se homoj scius pli pri ĝia filozofio, eble ili ne plu prognozos la finon de scienco. ★

## Belartaj konkursoj

Novjorka esperantisto Ulrich Becker gajnis la du unuajn premiojn por prozo en la belartaj konkursoj de UEA, kiel anoncite dum la UK en Pekino. Lia rakonto *Inico* aperos en la sekva numero de *Fonto*, periodaĵo el Brazilo, redaktita de fama verkisto Gerrit Berveling el Nederlando.

Ulrich havas sian propran eldonejon Mondial en Novjorko, en kiu lastatempe aperis traduko de *Princo Arĝenta* de Aleksej Tolstoj, rusa verkisto de la 19-a jarcento, kaj sia propra poemaro *Ĉiuj dioj estas for . . . Novjorkaj Poemoj*. Lia krimromano *New York Maniac* en la germana jam aperis antaŭ pli ol jaro. La retadreso estas *librejo.com*. ★

*– Arnold VICTOR*

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Oktobro 2004** — **15**

ESNY OPEN HOUSE

Talks in English about Esperanto

*Friday, 6:30 p.m. at UFT*

**Novembro** — **7**

**Tagmanĝo**

*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM Plaza*

(Limdato por kontribuajoj por *Prismo* 138)


**19**

ESNY KUNVENO

*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

United Federation of Teachers (UFT)
50 Broadway, Second Floor, Room A, NYC
(between Bowling Green and Exchange Place)

**"IBM" Building Atrium**
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium



## Novjorko estas librolando

La 2-an de oktobro mi starigis tablon ĉe la jara novjorka librofoiro, kiu troviĝis ĉijare en nova loko: Washington Square parko. Mi trovis bonan lokon en LaGuardia Place ĝuste norde de la 3a Ŝtrato. Preterpasantoj vidis kolekton da libroj, kiun mi metis sur tablon, kaj oni forprenis kvindek faldfoliojn pri Esperanto. ★

*– Tom ECCARDT*



FOTIS: MAKI SANO

## IBM Plaza

La 3-an de oktobro pli malpli 10 homoj renkontiĝis ĉe IBM Plaza por babili. Ulrich BECKER kunportis ekzempleron de sia nova libro de poezio, *Ĉiuj dioj estas for . . .*, kaj donacis ĝin al nia klubo. Oni ankaŭ diskutis ĉinajn literojn kaj komputilaĵojn. ★

*– Tom ECCARDT*


ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

| Prezidanto | Korespondа Sekretariino | Protokolisto |
|---|---|---|
| Thomas Eccardt (212) 477-6516 | Rochelle F. Grossman (718) 457-1490 | Stuart Green (631) 751-5683 |
| **Vicprezidanto** | **Kasistino** | **Program-Direktorino** |
| Thomas Leong (718) 981-4252 | Sofiya Soskina (914) 813-2495 | Maki Sano (212) 614-9184 |



**Novjorka Prismo**
Numero 137 – Oktobro 2004
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

| Redaktoro | Subredaktoroj | Desegnistino |
|---|---|---|
| Jim Medrano (212) 982-5029 | Thomas Eccardt, Nancee Medrano | Mary Pulley |

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com


© 2004 Esperanto Society of New York